



N-ro 53

2/1981 Julio

12a jaro

Red: Rudolf Burmeister
V. Firl. Str. 30, DDR-9047 Karl-Marx-Stadt



Saluton, karaj geamikoj!

Jen parolas via redaktoro. Iom malfrue ĉi-foje mi sukcesis pretigi nian informilon. Unue mi devis prepari grandan ekspozicion pri Esperanto en la kadro de "Tagoj de Kulturligo", kaj por sama okazo mi preparis aparte filatelan ekspozicion pri Esperanto. Due mi estis prezidanto de LKK por la "III-a konferenco de Esperantistoj en Kulturligo de GDR". Tiu konferenco okazis en mia urbo kaj ni fondis tie la "Esperanto Asocion de GDR". Lige kun tiu konferenco min atendis sufiĉe da taskoj. Kaj trie mi partoprenis post konferenco sciencpraktikan esperantistan simpozion "1300 jarojn Bulgario", kiu kompreneble ankaŭ postulis preparon.

Kompreneble sub tiuj kondiĉoj ne eblis okupiĝi pri nia informilo, kaj plie: amasiĝis nerisponditaj leteroj ĉe mi, kiujn mi nur nun povas respondi. Havu do paciencon.

Kaj nun mi, iom haste, komencas fari nian informilon kaj esperas, ke vi en ĝi denove trovos utilajn informojn. Mi devas danki al ĉiuj niaj geamikoj, kiuj per siaj informoj helpis, kaj mi petas, ke ancorau pli aktive niaj membroj kunlaboru por nia informilo. Tre ofte mankas la detaloj kaj oni alsendas nur la nudajn faktojn. Kvankam mi estas amiko de la "naturistoj" kaj ŝatas nudajn faktojn, mi tamen preferas iom da tekstilo ĉirkaŭ tiuj, ĉar tiel la tuto estas pli interesa.

Niaj novaj stampoj

Vivu ni en paco! (BRA 33)

Okaze de la "Semajno de Internacia Amikeco" la Esperanto-klubo en la brazila Sorocaba iniciatis poŝtan stampon, kiu pro ĝia originaleco tre plaĉas al mi.

La dulingva teksto

VIVU NI EN PACO SUB LA SAMA SUNO
12a SEMANA DA AMIZADE INTERNACIONAL

ĉirkaŭ kvinpintan sunon kaj kvin brakoparoj formas E-stelon, kies manoj havas preĝan pozicion.

En la stampo plie aperas la datoj

21 A 27-II-81 kaj la indiko ECT SOROCABA SP

La al mi sendita koverto portis 30 Crs-pm kaj estis sendita kiel presaĵo aerpoŝte. La supre priskribita memoriga stampo nuligas la poŝtmarkon, dum la normala poŝta nuliga stampo kun la dato de 23 FEV 81 situas apud la poŝtmarko.

La Esperantoklubo eldonis memorigan koverton kun la emblemo de la semajno de internacia amikeco. Ni kore gratulas niajn brazilajn amikojn pro la simpatia stampo!

GDR 12 el Leipzig

La tradicia IFER denove okazis inter 13-15.3.1981 en la foira urbo Leipzig/GDR. Partoprenis centoj da lingvo-geamikoj el tri landoj. La viglaj organizantoj sub la gvido de s-ano Beau denove iniciatis poŝtan memorigan stampon. Bedaŭrinde ĝi aspektas tute same kiel tiuj IFER-stampoj de la antaŭaj jaroj. Tio ne tro al ni filatelistoj plaĉas ĉar en niaj ekspozicioj tiuj sambildaj stampoj enuigas la vizitantojn kaj eventualaj jurioj kverelas kun ni pro ripeto de motivo, kion oni ne "darfas" pro iuj reguloj.

La stampo portas germanlingvan tekston ESPERANTOTREFFEN kaj la jam konatan emblemon IFER 81.

Por la stampo aperis nova E-pk kun IFER 81-emblemo kaj la teksto Internationales /Esperanto Messtreffen/ Leipzig, 13-15.3.1981.

GDR 13

Laborista Esperanto Movado 75-jara

La stampo numero GDR 13 venas el Karl-Marks-Stadt/GDR kaj funkciis de 16.4.–24.5.1981 en la ĉefpoŝtejo de la urbo. En la stampo estas la germanlingva teksto

75 JAHRE ARBEITER ESPERANTO BEWEGUNG (75 jaroj laborista Esperanto Movado)

kaj ĝi montras portreton de Ludwig Renn, kiu estis la unua prezidanto de IAREV (Internacia Asocio de Revoluciaj Esperantistaj Verkistoj) kaj fama germana poeto-proleta. Li partoprenis la hispanan militon kaj tiu funkciis i.a. kiel staba ĉefo de la 11a Internacia Brigado. Laste tre famiĝis liaj esperantaj salutvortoj, kiujn li direktis pere de la hispana E-gazeto "Popola Fronto" al la antifaŝistaj esperantistoj en la tuta mondo.

La stampo aludas pri la fondiĝo de la Internacia Asocio Paco Libereco 1906 en Parizo, kies organo "Internacia Socia Revuo" raportis pri la vivo de la laboristoj en multaj landoj.

Kaj jen la detaloj pri kialo de tiu stampo: De 16.4.–3.5. en tiu urbo okazis sufiĉe atraktiva E-ekspozicio en la sino de granda kulturliga ekspozicio pri diversaj ĝiaj sekcioj kiel ekz.: fiŝoj, ranoj, orkideoj, kaktusoj, foto, pm kaj ankaŭ Esperanto apud aliaj sekcioj. En la ekspozicia halo estis instalita speciala poŝtagentejo kiu havis du memorigajn poŝtajn stampojn: nian E-stampon kaj duan pri la Tagoj de Kulturligo, sed en germana lingvo, sekve tiu ne interesas nin. Laŭ miaj konstatoj dum la tuta tempo la poŝtistoj havis violinkan kusenon por la stampilo.

Post la 3.5. ambaŭ stampiloj estis uzataj ĝis 24.5. en la stampejo de la ĉefpoŝtejo, kaj tie oni disponas pri nigraj kusenoj. Tiel naskiĝas diversaj koloroj, kiuj ĉagrenigas nin filatelistojn, sed eble nur la super-specialistojn. Tiel ankaŭ povas naskiĝi fuŝdatoj, se la poŝtistoj ne zorge ĉiutage korektas la daton. Cetere de 22–24.5.1981 en tiu urbo okazis la "3a Centra Konferenco de la Esperantistoj en Kulturligo de GDR" kaj la 200 delegitoj fondis 24.5. la "Esperanto-Asociacion en Kulturligo".

Kiu ĝis ĉi tie legis, nun ekscias, ke aperis E-pk kun la Renn-saluto kaj E-pk kun la kongresa emblemo.

Plie verda memoriga koverto kun tiu emblemo kaj ruĝa memoriga koverto kun kongresa insigno. En ambaŭ aperas monumento de Karl Marks, kiu staras apud la kongresa centro.



FRA 46 estas ms


Niaj francaj geamikoj Legris kaj Amouroux informis pri tiu "meĥanika poŝt-stampo" = maŝinstampo, kiu funkciis de la 2a de marto ĝis la pentekosta landa kongreso. Daton precizan momente mi ne scias. Tiu stampo diskonigas franc-lingve, ke en Perpignan okazas dum pentekosto nacia E-kongreso.

La tekstoparto de la ms aperas maldekstre, la dekstrajn nuligajn datstampojn ni trovas en pluraj variaĵoj:


- 45-1 = kun urbonomo Perpignan R.P.
- a = kun hora indiko
- b = sen hora indiko
- 45-2 = kun "P.P." anstataŭ urbonomo
- a = kun hora indiko
- b = sen hora indiko

"P.P."-stampoj kaj la stampoj sen hora indiko, kiuj anstataŭe montras steleton, estas malpli ofte troveblaj. Tion kompreneble ne kulpas la esperantistoj lokaj sed nur la poŝto. Dum longtempa uzado de stampilo povas aperi tiaj diferencoj.

Ni tamen esperu, ke nia Amouroux, kiu ja loĝas surloke, sukcesis akiri sufiĉan kvanton por niaj klubaj geamikoj.



PERPIGNAN R.P. 4 6-81



Forgesita FRA 45

Nur ĉi-momente mi rimarkis, ke ni forgesis tutsimple, fari notojn pri la franca stampo de 31 Mars 1979 el Cerny. Fotokopion ni tamen aperigis en ia n-ro 49.

Tiu stampo havas la francan tekston

CONGRES PARIS ILE de FRANCE kaj ESPERANTO PHILATELIE

Pri kia kongreso temas kaj kio tie okazis, pri tio min ne antingis informoj.

Tute sambildan stampon ankaŭ kun la sama teksto mi nun ricevis de amiko Legris, sed ĝi havas la daton de 14 Mars 1981 kaj venas el DRAVEIL, strange tamen, ke tiu urbo portas saman poŝtan kodnumeron, nome 91, kiel urbo CERNY.

Mi petas niaj francajn amikojn, klarigi la aferon. Laŭ mia opinio temas pri reuzo en (au ne?) alia urbo, kaj ni devus doni al ĝi subnumeron, kiel ni tion jam praktikis ekz. ĉe la polaj stampoj.

Do ekz.: FRA 45-1 = Cerny (91) 31.3.79
 FRA 45-2 = Draveil (91) 14.3.81

XX Jubilea Pola Esperanto Kongreso

kunvenis en Katowice de 3–5.4.1981 kaj poŝtejo Katowice 2 la 4an de aprilo stampis per memoriga stampo kun la pola teksto

OGOLNOPOLSKI KONGRES ESPERANTYSTOW

La bildo en la stampo montras E-stelon, rom-ciferan XX kaj iujn ŝtonojn.

Mi ricevis la stampon sur memoriga koverta, kiu montras minejan lifto-turon kun verdstela supro kaj esperantlingva teksto pri la kongreso.

Dankon al nia kluba amiko Kosieniak, kiu sendis informon pri la nova pola stampo. (PO 122)

Nova reko-marko

"XX Ogolnopolski Kongres Esperantow Katowice" estas la teksto sur nova poŝta reko-marko. La mia havas la surpresitan numeron 000574.

Pro tiu ĉi informo ni dankas same al Kosieniak.

HU numero 77

JUNULARA ESPERANTO RENKONTIĜO – Szombathely, 1981.IV.4 tekstas tiu nova hungara stampo. La stampomezon okupas iu nedifinebla grafika artproduktado, super ĝi E-stelo, eĉ kun "E". Hazarde mi scias, ke la urbonomon oni prononcas "Sombathej". Detalojn mi bedaŭrinde ne ricevis, tial eblas prezenti nur nudan fakton ĉi tie. Ni devas danki al nia kara kluba amiko Fekete, kiu el la centro de Budapeŝto sendis ĉi informon. Kiel kuriozaĵon ni tamen citu ĉiloke, ke li loĝas en la plej mallonga strato de la hungara ĉefurbo. En tiu strato ekzistas sole unu domo-numero.

Itala nepoŝta el Kavalkaselle

Ekzistas italaj stampoj, kiuj aspektas plene poŝtaj, sed ne estas. Ili tekstas: 37010 Kavalkaselle (VR) Italio, Esperantujo kaj havas daton (mia 15.12.79). La sama eldonanto ankaŭ aperigis markojn, pri kiuj jam ni foje parolis.

BRA 32!

Bildon pri ĝi vi jam povis trovi en nia n-ro 52, p.2. Temas pri memoriga brazila stampo kun la teksto "15 jarojn Esperanto per la Radio-Klubo".

Havebla tiu stampo estas pere de nia stampo-banko, kiel ankaŭ preskaŭ ĉiuj aliaj menciitaj en tiu ĉi informilo.

Informis pri ĝi la E-klubo de Sorokaba.

BRA 34


certe aperos dum la UK en Brasilia. En la E-gazetaro oni ja momente sufiĉe tamburas pri nova marko, sed detaloj ne estis haveblaj. Ni do trankvile atendu, ĉu io aperos.

Brasilia-veturantoj!

Tiuj niaj klubaj geamikoj, kiuj partoprenos tiun UK, bonvolu surloke kontrolu, kaj poste informu!, kio aperos nova en la Esperanto-filatelio. Interesa estas i.a. eldontaĵo, ĉu FDC, kiuj stampoj (FDC-stampoj k kongres-stampoj), kiom da markoj en tutfolio, ĉu surmarĝenaj notoj ekzistas, eble eĉ ekzistas tutaĵoj, rekomarkoj, diversaj stampokoloroj, ĉu poŝtaj klientoj mem stampas, en kiuj tagoj funkciis kongresa poŝtejo ktp. Cetere ni mendis kunvenejon por ELF-AREK-kunveno en la kongreso, sed ankoraŭ ne havas gvidanton por la kunveno. Niaj klubanoj bonvolu surloke interkonsentu pri kunvena gvidanto, kiu iom direktu la aferon.



RD 2f



Pluvo en afrankstampa rubriko

AS 8-3 el Paderborn

Nia amiko Richard Hirsch bonvolis sendi al la redaktoro ekzempleron de tiu afrankstampo, kiu laŭ lokigo de la unuopaj partoj ŝanĝis la poziciojn: maldekstre nun la tekstoparto, meze la datstampo kun nova poŝtkoda numero (4790 anstataŭ 479) kaj dekstre la valorstampo.

AS 15 el Zeist

Werner Simon afable disponigis al la redaktoro koverton de la "BISSCHOPPE-LIJKE VASTENAKTIE NEDERLAND", Zamenhoflaan 17, Zeist, Pays-Bas kun afrankstampo. Maldekstre la tekstoparto "VASTENAKTIE SAMEN BOUWEN", meze la datstampo kun indiko pri Zamenhoflaan 17 en Zeist, dekstre la valorstampo kun la numero de la maŝino FR 15883.

AS 17 el Utrecht

Sinjoro Werner Simon ankaŭ informis pri tiu nova afrankstampo. Dekstre la valorstampo kun la numero FR 17731, meze la datstampo (26.IV.73) el Utrecht kaj maldekstre la noto "RADAR bv – Zamenhofdreef 65a". Tiu afrankstampo ne plu funkcias kaj estas malfacile trovi ĝin.

AS 21 (?) el Zeist

Nia kluba amiko Simon sendis al la redaktoro fotokopion pri strangeforma afrankstampo. Tiu stampo havas nur du pecojn: dekstre la valorstampo kun la numero P.B. 3286, indiko "060 Nederland" kaj noto pri la tarifo, maldekstre lokas la datstampo: en arkoforma supro la urbonomo ZEIST, sub ĝi la dato (19.6.80) kaj sube la noto "Zamenhoflaan 12".

AS 22 el Antwerpen

Pri ĝi mi mem eksciis per ricevo de koverto kun maja numero de la revuo esperanto. Sur ĝi troviĝis tiu por ni nova afrankstampo. Maldekstre la tekstoparto "ESPERANTO CENTRUM Arsenalstraat 5, B 2000 Antwerpen", en la mezo la datstampo (6.5.81) kaj dekstre la valorstampo kun la indiko pri la numero de la maŝino F 3640.

Nekonita argentina ms

Jam en la 2-a suplemento vi eble rimarkis noton pri ARG 5. Nur nun ni pri ĝi eksciis, 8 jarojn post ĝia uzado kaj ĝis nun nur unu ekzemplero troviĝas ĉe ni. Feliĉe mi ricevis de la posedanto fotokopion kaj sekve povas ĝin priskribi por vi, kaj povis ĝin katalogi.

Temas pri t.n. senfina maŝinstampo, kiu disponas pri du diversaj tekstopartoj:

NGRESO	ds	JUVENIL DE	ds
ARGENTINO		ESPERANTO	

La ds (datstampo) estas el Rosario, 1a S. Fe, la dato ne legebla.

Pri la stampo de Rosario 1941

En nia informilo nro 49 vi vidis fotokopion pri ĝi, kiun disponigis al mi amiko Vana. Nun mi disponas pri fotokopio de tuta koverto kaj povas detaligi la aferon.

Unue necesas korekti la tekston: INTERAMERIKO FILATELIKA EKSPozICIO E.F.I.R. (Tio ne estas korekta Esperanto, sed tiel la teksto aperas en la stampo).

EFIR signifas laŭ bone legebla "Caquet"-stampo: EXPOsICION FILATELICA INTERAMERICANA DE ROSARIO 1941. Dua triangula stampo tekstas: PRIME-RA CONENCION – FILATELICA ARGENTINA – ROSARIO 1941.

Sur la poŝtmarkoj aperis pliaj tri (!) diversaj stampoj:

1. okulfrape oficiala poŝta datstampo de 6.JUL.41 18 kun la teksto EXP. FILATELICAINTERAMER – ARGENTINA – ROSARIO
2. EFIR-stampo (kiel en nro 49) (kun Esperantoteksto)
3. EFIR-stampo en argentina (?) lingvo kun supre jam notita teksto. Anstataŭ stelon ĝi montras mapon.

Ambau EFIR-stampoj montras daton "6.JULIO 41"

Mi persone dubas pri la "poŝteco" de ambau EFIR-stampoj kaj supozas, ke temas pri memorigaj stampoj de la ekspozicia estraro. Eble ekzistas filatelaj gazetoj el la jaro 1941, kiuj informas pri la tuta afero, kiu tion povus kontroli?

Novaj E-pk el GDR

IFER 81

Poŝtkarto kun nominalo de 10 pfenigoj
Verda surpriso kun la emblemo de IFER
Eldonita en Leipzig

Ludwig Renn

Poŝtkarto kun nominalo de 10 pfenigoj
verda surpriso kun autografo de Renn el la hispana milito kaj klarigo, ke Renn estis 1-a prezidanto de IAREV
Eldonita en Karl-Marx-Stadt okaze de "Tagoj de Kulturligo"

3-a E-Konferenco

Poŝtkarto kun nominalo de 10 pfenigoj
verda surpriso kun la emblemo de la konferenco
Eldonita en Karl-Marx-Stadt okaze de la konferenco

Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR

Poŝtkarto kun nominalo de 10 pfenigoj
Nigra/verda/ruĝa surpriso kun supra teksto k verda stelo
Eldonita de la Centra Estraro

La E-pk de GDR jam en filatela tutajkatalogo!

La tutrespublika filatela gazeto en GDR "Sammler-Express" en numero 3/81 aperigis suplementon por katalogo de tutaĵoj. En kategorio C ni trovis i.a. la pk pri Bacon kaj Kalocsay.

Ne nur la E-filatelistoj koleras

Pro la subita inundo de la GDR-E-pk komencis kvereli ankaŭ la tutaj-filatelistoj en FDR, kiuj estis devigataj, preni ĉiujn E-pk pro esti kompleta en sia kolekto. Cetere ankaŭ mi strabokule sekvas la evoluon de tiu inundo, ĉar ankaŭ deziras esti kompleta. La Filatelista Asocio de GDR petis la E-A- de GDR, bremsi tiun evoluon, certe tio okazos. Por ni E-filatelistoj tamen tiu "inundo" ne estas problemo, ĉar preskaŭ ĉiuj niaj klubaj geamikoj automate ricevas tiujn E-pk kune kun la novaj stampoj.

Aliaj pk kaj kovertoj

Kongreso de Sveda Esperanto Federacio 1981 (karto)	
3-a E-konferenco en GDR	(koverto kun ruĝa alpresio)
3-a E-konferenco en GDR	(koverto kun verda alpresio)
20-a Pola E-kongreso	(koverto kun verda alpresio)
23-a Kataluna E-renkontiĝo	(bildkarto kolora)
S E F T	(karto kun verda alpresio)
Handikapita Jaro 1981	(karto kun kolora alpresio)
E-poŝtmarkoj	(karto kolora kun 31 E-pm) eldonita de membro Lefebre

Glumarkoj

Nia glumark-fakulo obstine silentas al la redaktoro, la kialo ne estas konata al mi. Jen kelkaj novaj glumarkoj, kiuj al mi konatiĝis:

IFER 81

– verda sur blanka

– verda sur arĝenta

3-a E-konferenco en GDR

folieto kun 3 glumarkoj (vidu en n-ro 52, p. 11)

Sveda E-Kongreso 1980

Sveda E-Kongreso 1981

Insignoj

3-a E-konferenco en GDR

verda insigno kaj ruĝa insigno kun Karl-Marx-monumento

Bulgario 1300

trikolora, metala insigno

Sendube ekzistas multe pli, sed informoj ne atingis nin. Tamen en nia klubo membras pluraj insigno-kolektantoj, eĉ ili silentas. Eĉ iam ekzistis iu klubo "KKEI", kiu ŝajne ne plu ekzistas. Jam pli ol jaro "KKEI" silentas.

Demando pri tutajkatalogo

"Mi deziras scii, ĉu kaj kiam aperos la promesita katalogo de Esperanto-tutaĵoj" demandas amiko Pignatelli kaj multaj aliaj klubaj geamikoj.

La manuskripton jam antaŭ pli ol jaro pretigis nia kluba amiko Vladimir Vana, eĉ kun fotoj, kaj sendis ĝin al s-ano Vladimir Hasala, kiu promesis, aperigi ĝin. Ni ne konas la kaŭzon, kial nenio sin movis en tiu afero, sed tamen esperas ke baldaŭ s-ro Hasala realigos tiun promeson. Li ja dum multaj jaroj akurate gvidis la sekcion de ĉeĥoslovakaj E-filatelistoj.

"Mi deziras scii la ekzaktan daton pri la apero de la diversaj E-pk, listigitaj en la Burmeister-katalogo".

La eldontoj al ni ne estas konataj, sendube la promesita tutajkatalogo enhavos tiujn informojn.

Anoncetoj:

Deziras aĉeti poŝtmarkojn Bavario 1911, renversitan 8 sur soveta Popov, sendantan Zamenhof de SU kun kaj sen filigrano. Povas pagi per 300-dinara de Jugoslavio aŭ per dolaroj.

Frederick Nietert, 2550 15th, Douglas, AZ 85607 USA

Biblio-Revuo-afrankstampon sendas I.A.B.O., I-48100 Ravenna, Piazza Duomo, 4 kontraŭ 1 IRK

La du pm de 10-a brazila E-kgr serĉas P. Thaey. Povas rekompenci per ĉiulandaj pm. Serĉas ankaŭ aliajn esperantaĵojn.

Antonio Denes, H-5900 Oroshaza, Str. Veres Jozsef 27 kolektas kaj interŝanĝas glumar-kojn. (Bonvolu informi redaktoron pri viaj novakiritaj glm!)

Koran bonvenon!

Pierre Thaey, Pieter Reypenslei 47, B 2510 Mortsels, Belgio

Kolektas: Neuzitajn pm-seriojn pri naturprotektado, naciaj parkoj, fosilioj, kavernaj pentraĵoj kaj Esperanto-filatelajojn. Deziras interŝanĝi (ricevi) E-filatelajojn, povas sendi pm-seriojn el la tuta mondo. Ne posedas duoblaĵojn de E-stampoj.

Salvador Raymundo, Cx. P. – 11032 Batel

80.000 Curitiba – Parana, Brazilo

Kolektas: Esperanto-filatelajojn

Marco Hugo Pedraz, Menorca 1-12, Lugo, Hispanio

Kolektas: Poŝtmarkojn, stampojn ktp. Ne skribis detalojn.

Eluizio Bueno Rodrigues, Cx. P. 168, 18.100 Sorocaba – SP, Brazilo

Kolektas: Esperanto-filatelajojn kaj skoltajn filatelajojn.

Informis pri nova adreso:

Francesco Pignatelli, C.P. 568, I-35100 Padova

Kolektas E-filatelajojn inkl. de tutajoj.

Pri nia membrostato

3.4.1981 estis registritaj 115 membroj en 32 landoj. Je tiu dato mankis kotizoj por 1981 de 33 membroj.

ESPERANTO-CENTRUM

Arsenaalstraat

B-2000


ANTWERPEN



Abresender

Postkarte

Carte postale



D. Blanke

108

Berlin

(Charlottenstr. 60
(Esperanto)

Pace de "Popola Fronto"
mi salutas ĉiujn antifaŝistojn
Esperantistojn en la mondo
Ludwig Renn
Katowice, 4.8.38

Ludwig Renn


Erster Präsident

des Internationalen Verbandes

Revolutionärer Esperanto Schriftsteller

(IAREV 1929-1939)

3 13 919 LG 116/267/80



Ni petas pardonon pro la malfruiĝo de la informilo, sed fakte estas kaŭzoj, kiujn ni ne povis regi, interalie la altigo de svedaj frankreguloj.

I.P.

Kluba informilo de ELF-AREK
Esperanto Ligo Filatelista
Amika Rondo de Esperantaj-Kolektantoj

Redaktoro

Rudolf Burmeister, DDR 9047 Karl-Marx-Stadt, W.-Firl-Str. 30

Prezidanto


Ivar Paulsson, S-171 33 Solna, Algatan 3. Poŝtkonto: 51 57 85-4

Stampobanko

Werner Heimlich, D-304 Soltau, Fröbelstr. 4

Kotizo por 1981

15 validaj IRK, (maldekstre stampotaj!!) aŭ 36 svedaj kronoj. Prefere sendu la monon al I. Paulsson.



*Al Sijoto:
Lech Kosiniak
ul. Piłkna 16 b" m. 9.
00-539 Warszawa*